# La komunista junularo estas sola fonto kaj respondeca pri la Partio




Havano, apr 17 (RHK) Dum la unua labosrsesi de la 8-a kongreso de la Partio, la delegitoj eklaboris en komisionoj; en la 2-a laborkomisiono, gvidita de la dua sekretario José Ramón Machado Ventura, oni analizis la funkciadon kaj ideologian laboron de la junkomunista unio (UJC).

?i-rilate, la dua sekretariino de la nacia komitato de UJC, Aylín Álvarez, certigis ke la junularo estas la sola kaj respondeca fonto de la Partio, kaj ?ia funkciado respondas al preparlaboro por i?i la posteuloj.

Pri la batalo okazanta en la ciferecaj spacoj, la estro de la ideologia departermento de la  Partio, Víctor Gaute, precizigis ke ne nur ?i evidenti?as en la ideologia batalo, sed anka? en la  landdefendo.

Li elstarigis ke la batalo okazas en reala tempo, kun novaj postuloj kaj ni devas ?in fronti; por tio li instigis la bazajn organizojn de la Partio stimuli aktivismon en la sociaj retoj.

Aliflanke, en la komisiono 3-a, gvidita de Miguel Díaz-Canel, membro de la politika buroo kaj prezidento de la respubliko, oni debatis pri la politiko por formi gvidantojn.

La plej granda defio estas ?e la gvidantoj, asertis Díaz-Canel,  kaj tiu politiko devas esti tuta sistemo, kaj tial ni bezonas ke la plej bonaj gvidantoj estu enpostenigitaj.

Ni devas kapabligi ilin la?bezone por esti submetitaj je longaj periodoj malfavoraj, kaj ili devas alpropri?i je la iloj favorantaj trovi solvojn al la problemoj.

En la komisiono 1, gvidita de la ?efministro Manuel Marrero, oni pritraktis la ekonomiajn temojn, kaj li esprimis ke spite al la kompleksa scenejo nuntempa, ni ne haltis nek rezignis je estontaj planoj.

Li memorigis la ellaboron de la Nacia Plano por Ekonomia kaj Socia Evoluo ?is 2030  kadre de la starigo de la gvidlinioj ?tataj, kies praktika esprimo ku?as en la strategio sociekonomia, kaj anka? priparolis la batalon kontra? la Kovim-19 kiel prioritato, kiu postlasas multajn spertojn.

Hodia?, la delegitoj al la 8-a kongreso partia, plu sesios en laborkomisionoj.

fonto: Granma/Radio Reloj

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/254381-la-komunista-junularo-estas-sola-fonto-kaj-respondeca-pri-la-partio

Radio Habana Cuba